

The North American

ESPERANTO REVIEW



San Diego, 1955 Convention City

March - April, 1955

Good Books for Your Spring Reading

La Knaboj de Paŭlo-Strato30
La Princo kaj Betty35
La Alia Pasinteco	3.00
Gosta Berling35
Kiso de la Reĝino75
Kredu min, Sinjorino	1.65
Murdo en la Orienta Ekspreso35
La Nekonata Konato	<i>paper</i> , \$1.00; <i>bound</i> 1.25
Princino de Marso35
Ringo de Generalo75
La nova Testamento	\$.25 and .50

Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.

TEXT BOOKS, DICTIONARIES, READERS

The Esperanto Teacher	\$.45
Esperanto for Beginners10
Nelson's Esperanto Course	1.50
Step by Step in Esperanto	1.50
The Edinburgh Pocket Dictionary85
Fulcher and Long English-Esperanto Dictionary	2.35
Millidge Esperanto-English Dictionary	2.50
Johano kaj Silvio30
Junaj Detektivoj35
Gaja Leganto per Esperanto30

Write for complete Book-List:

Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.



The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Third Year

March-April, 1955

No. 3-4

CONTENTS

Triumph in Montevideo.....	2
Esperanto Around the World.....	5
Esperanto in North America.....	6
Third Annual Congress of ELNA.....	6
Hans Christian Andersen.....	8
40a Universala Kongreso de Esperanto.....	12
Novaj Libroj	14
Announcements	16

The North American Esperanto Review

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

Addresses: Subscriptions and bulk orders should be sent, with payment, to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: David B. Richardson, 3412 No. Mullen, Tacoma 7, Wash.

Deadlines: The *Review* is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the editor no later than

the 15th of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *President:* John L. Lewine, 52 Riverside Drive, New York 24, N. Y.; *Vice-President:* James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; *Secretary:* Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer:* Edward W. Pharo, Jr., County Line Rd. and Simms, Somerton 16, Pa.; *Chairman, Executive Board:* F. R. Carlson, 2116 N. 35th St., Seattle 3, Wash.

Membership Dues: Regular Member, \$3; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member but receiving only one copy of publications, etc., \$4.

Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.

Make checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

Triumph in Montevideo

As a climax to 67 years of effort by the proponents of Esperanto comes the detailed story of what took place in Montevideo, Uruguay, during the Eighth General Conference of UNESCO. A more dramatic series of events can scarcely be imagined, as what appeared to be utter failure turned suddenly to triumph in the Conference's closing hours. UNESCO's action in approving a resolution favorable to Esperanto was the culmination of several years' effort by the Universal Esperanto Association, that organization's *Centro de Esploro kaj Dokumentado*, and the Center's head, Dr. Ivo Lapenna. Two years earlier, in Paris, UNESCO had passed a resolution calling upon its Director-General to communicate with the member-nations regarding the petition for Esperanto and, on the basis of the comments received from the governments concerned, to make the necessary preparations for enabling the Eighth Session in Montevideo to take action concerning the petition.

The Director-General, on Feb. 9, 1953, did communicate to all member-states document CL/720 in which the decision of the Paris Conference was announced and the comments of the various governments were solicited. On June 1, 1954, UNESCO published a 17-page, 3-language report (8C/

PRG/3) of the replies made by the member-nations. Nine countries did not wish to take a position regarding the petition. They were Australia, the Dominican Republic, Iran, Jordan, Laos, Monaco, New Zealand, Pakistan, and Uruguay. Nineteen states declared themselves opposed to any favorable action. Nine countries—Ceylon, Denmark, Germany, the Netherlands, the Philippines, Siam, South Africa, Sweden, and Viet-Nam—took the position that any sort of encouragement of the International Language was undesirable. Ten states favored Esperanto; they were Austria, Cambodia, Cuba, Guatemala, Honduras, Lebanon, Mexico, Norway, Spain, and Yugoslavia.

UNESCO subsequently added to its document 8C/PRG/3 a memorandum prepared in Haarlem last summer on the occasion of the 39th Universal Congress of Esperanto.

An enormous amount of background work was carried on by various Esperanto organizations in preparation for the Montevideo Conference, particularly by UEA and the C.E.D. Briefly, this work involved (1) making available to governmental and other organizations information about Esperanto and the international language movement; (2) preparing for a gigantic *Universal Exposi-*

tion of *Esperanto* in Montevideo itself; and (3) contacting members of the various UNESCO delegations in order to arrange for the introduction of a resolution favorable to *Esperanto*. This last was particularly important, as no action would be possible unless some specific resolution were drawn up and presented to the Conference. In addition, authorization was secured for Dr. Lapenna to attend the Conference as an observer for the Universal Esperanto Association, and further, UEA applied for admission to consultative arrangements, which imply a close official relationship between the two organizations, so that (1) UEA could, without special invitation, send an observer to any session of the General Conference; (2) representatives of UEA would be invited to attend other meetings and conferences of UNESCO when the subject related to the international language question; and (3) UEA would have the privilege of submitting its opinion concerning any subject which comes before UNESCO.

The Conference opened on November 12. The next day, Dr. Lapenna was accepted by the Conference as an official observer for UEA. On the 25th, the Executive Board voted unanimously to admit UEA to consultative arrangements. This action was approved by the Plenary Session on Dec. 8.

The matter of the petition in favor of *Esperanto* was something else again. Until Dec. 2, when the subject of the *Esperanto* petition was due to come before the Rules Committee at almost any hour, no delegation had

declared its intention of introducing a resolution. On that day, the Mexican delegation decided to propose a very objective resolution. Within hours, other delegations known to be friendly to *Esperanto* were contacted and some 30 of them promised to support the resolution when it was introduced.

(Continued next page)

**Official English Text of the UNESCO
Resolution 8C/DR/116**

The General Conference, having discussed the Report of the Director-General on the International Petition in favour of *Esperanto*,

(1) takes note of the results attained by *Esperanto* in the field of international intellectual relations and in the rapprochement of the peoples of the world;

(2) recognizes that these results correspond with the aims and ideals of UNESCO;

(3) authorizes the Director-General to follow current development in the use of *Esperanto* in education, science and culture, and, to this end, to co-operate with the Universal Esperanto Association in matters concerning both organizations;

(4) takes note that several Member States have announced their readiness to introduce or expand the teaching of *Esperanto* in their schools and higher educational establishments, and requests these Member States to keep the Director-General informed of the results attained in this field.

Although the petition could have come up for discussion almost momentarily during the late session that night, other matters intervened and by the time the committee took up the matter of the petition it was on Saturday evening, Dec. 4.

Normal procedure would have been to give the floor first to Dr. Lapenna, who had requested that privilege some time before. However, at the same moment in which Dr. Lapenna raised his hand to be recognized by the Chairman, the Danish delegate, Prof. Blinkenberg, asked for and received the right to speak. Prof. Blinkenberg proceeded to make a series of entirely irresponsible statements about Esperanto designed to elicit laughter, not to deal seriously with an important matter. He stated, among other things, that Esperanto is not international, that it was "invented" not by a linguist but by an amateur, that it has a meager vocabulary and a primitive syntax, and that it is incapable of being used for literature or cultural purposes. One remark which will no doubt be repeated in every history of Esperanto for years to come was the already famous statement that the most the International Language would be good for would be to translate Uruguayan menus!

In the frivolous atmosphere created by Prof. Blinkenberg, Dr. Lapenna was allowed three minutes in which to state the case for Esperanto.

Ivo Lapenna is probably the greatest Esperanto-speaking orator in the world today. Summoning all his abilities he completely discarded the speech which had been prepared, and used the three minutes as best he could first to restore dignity to the meeting, and then to put in as few words as possible a summary of the argument for the Mexican resolution. After Dr. Lapenna, the Uruguayan delegate spoke briefly and after him

the Norwegian delegate put in some good words for Esperanto. The Chairman then called for a vote on the resolution, and in an atmosphere of confusion caused by the completely irresponsible statements made by Prof. Blinkenberg, the resolution was defeated 23 to 3, with 19 absentions.

The vote was by a show of hands, and therefore no official record was made of the voting; however, Dr. Lapenna noted that the three nations voting for the resolution were Mexico, Uruguay, and China; those voting against it included Sweden, Norway, France, Belgium, Denmark, the Netherlands, Switzerland, the United States, Great Britain, Egypt, Cuba, and Greece. The iron curtain countries abstained.

The unfavorable vote would ordinarily have put an end to any chances for favorable action. The proponents of Esperanto, however, were not willing to give up the fight so easily, and the same evening they met to make plans for further action. A "letter of protest" was drawn up in the name of the Uruguayan Esperanto Society and delivered to the press. On Monday, the Society returned to the Danish Consulate a cultural film in Esperanto about Denmark, sending along with it a letter pointing out that the attack by Prof. Blinkenberg had not only offended the 16 and one-half million people who stand behind the Esperanto petition, but had also offended the Danish government, which had produced the film.

By the middle of the week, many of the newspapers and magazines in Montevideo had printed all or part of the "letter of protest" or even editorials of their own which said much the same things. On the radio Dr. Lapenna described the committee's shabby treatment of such an important cultural matter. Suddenly it be-

(Continued on page 13)

ESPERANTO AROUND THE WORLD

Australia

The Australian Association of Model Societies is planning an international model fair in Melbourne for August and September of this year. The Association has placed at the disposal of the Australian Esperanto Association a stand in which to display models contributed by Esperantists from around the world. This is an unusual opportunity to demonstrate the usefulness of Esperanto, and the Australians deserve the support of Esperantists everywhere.

Models of ships, trains, autos, motorboats, airplanes, and other models reflecting the "national character" of North America should be sent, along with descriptions in Esperanto, to the following address: Aŭstralia Esperanto - Asocio, Box 2122 T, Elizabeth St., Melbourne, Australia. Models must be mailed early enough to insure their arrival in Australia by July 15.

London

On Feb. 23, an airplane carrying Russia's Andrei Gromyko attempted to land at London, England, but was unable to do so for about an hour due to the inability of the pilot to understand landing instructions radioed from the control tower. Even though a translator was on hand, the extra delay while radio messages were

repeated made the instructions clear to the pilot only after it was too late to follow them due to the rapidly changing traffic situation over the airport. Finally a Russian was brought into the control tower and instructions were transmitted directly in that language, so that the plane was able to land safely. During the time that communications were hampered by the language difficulty, the plane represented a danger to other aircraft in the area.

Rome

Radio Rome broadcast, on April 1, its 500th program in Esperanto.



HEROLDO DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA
ORGANO DE LA ESPERANTO-
MOVADO

Prezj:

Abono tutjara -----	\$4.00
Abono januaro-junio -----	2.50
Abono julio-decembro -----	2.00
Abono subtenanta -----	8.00
Anonceto po 25 vortoj -----	.50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

ESPERANTO IN NORTH AMERICA

Officers have been elected for the newly formed Esperanto Society of San Diego. Frances E. Helmuth is President; Arthur Todd, Vice-President; Miss Alice Ferris, Secretary; Dirk M. Brink, Treasurer; and Wm. Dale Brown, Recorder.

Although the Society was founded only recently (March 26), the group is already extremely active, particularly in preparing for a successful Third Annual Congress of ELNA to be held in San Diego July 8-10.

The April issue of *Catholic Digest* carried a condensation of an article by William D. Ryan entitled "Esperanto is Easy," an overall sketch of the Esperanto movement in general and, in some detail, the organizations and activities of Catholic Esperantists.

Wisconsin newspapers carried numerous articles and letters-to-the-editor about Esperanto in recent weeks, mostly due to the efforts of our active member in Middleton, Glenn P. Turner.

A plug for Esperanto was included in a column in *The Barometer*, published by and for the U.S. Naval Repair Facility, San Diego, on March 4. The column is written by ELNA-member Elwyn C. Pollock and described courses now being conducted in San Diego schools by Dirk Brink.

The Tacoma News Tribune published a letter from Dave Richardson calling attention to the significance of UNESCO's resolution favorable to Esperanto.

SIGN UP NOW FOR THE 1955 CONVENTION OF ELNA San Diego, Calif., July 8, 9, 10

The Esperanto Society of San Diego will be host to this year's ELNA Convention. Dirk Brink, Chairman of the Local Congress Committee, has submitted the following tentative program:

Friday, July 8

9-11 p.m.—Official reception at the Hotel Manor. *Interkonatiĝa vespero*. Radio broadcast. Display of Esperantiana. The meeting and the display will be open to the public.

Saturday, July 9

9-11 a.m.—Business meeting, at the Hotel Manor. Reports from League officers and committees.

12:30-1:30 p.m.—Lunch in the Cafe del Rey Moro, located in famous Balboa Park.

2-4 p.m.—Excursion through the world famous zoological gardens at Balboa Park, including a one hour guided tour by bus past the cages.
7:30 to 10 p.m.—Banquet at the Hotel Manor.

Sunday, July 10

8:30-10 p.m.—Excursion through San Diego harbor. Visits to U.S. fleet in "mothballs" and many other interesting points.

12-1 p.m.—Closing meeting at Hotel Manor, concluding with a 15-minute religious service (non-denominational) conducted in Esperanto by Elwyn Pollock.

Congress Headquarters

Our Congress headquarters will be the Hotel Manor, 2223 El Cajon Blvd.

Rooms at the hotel should be reserved well in advance (see rates below). The hotel maintains a giant-size, heated swimming pool open the year around for use by hotel guests without charge. Dining rooms and convention rooms are air-conditioned. Motel rooms, hotel rooms and *cabanas* are available. Motel rooms have television without extra charge. For groups there are cottages at \$4 a person (minimum 4 persons).


Congress Fees

The Congress fee this year is \$3 per person. Children under 18 do not need to pay a fee if accompanied by their parents. Esperantists from countries other than the United States and Canada will be welcomed as guests of the Congress and do not need to pay the Congress fee.

In addition to the Congress fee, persons planning to attend the Congress must pay a Program fee of \$7 per person to cover the cost of special arrangements including banquet, luncheon, and sight-seeing trips. For children, the Program fee is only \$5.

Membership-by-mail

If you cannot attend the Congress in person but want to help to make it a success, you can "attend" by mail,



Balboa Park, San Diego

receiving your ticket, official program, copies of reports and other literature distributed to Congress members, by paying the Congress fee of \$3. Of course, to be a member by mail only, you do not need to pay the Program fee of \$7.

Hotel Rates

Singles: \$5.50, 6.50, 7.00 and 7.50

Doubles: \$7.50, 8.50, 9.00 and 9.50

Suites: \$15 and \$25.

Third person in a room: \$2.50.

Let's go to the Congress!

Hans Christian Andersen


ANTAŭ 150 jaroj, la 2-an de aprilo 1805, naskiĝis Hans Christian Andersen en la malgranda urbo Odense en Danujo, en plej malriĉa medio, ŝajne plej malbonaj kondiĉoj por feliĉa estonteco, kaj tamen li fariĝis la plej fama filo de sia lando, unu el la plej grandaj fabelverkistoj de la mondo. En sia maljuneco li vidis sian nomon flanke de la nomoj de Homer, Dante, Cervantes, Shakespeare, Goethe. Estis—kiel li mem sentis kaj esprimis tion—fabelo en la realeco, realeco pli miriga ol la elpensajoj de la fantazio.

Kiel tio okazis? Ĉu ni povas doni klarigon aŭ ĉu ni nur diru: **genio**, kaj meditu pri la enigmoj de la estado? Ni respondu, ke ni povas kompreni almenaŭ *iom* de la enigmo. Enigmoj ordinare estas klarigataj per malofta kaj stranga kombino de cirkonstancoj kaj hazardoj, mozaikenigmo de la sorto. Ni ankaŭ simple povas nomi tion “**bonŝanco**”. Ni bone vidas, ke la hazardo kaj la “**bonŝanco**” estis netakseblaj helpoj por la energio kaj preskaŭ neŝanceligebla memfido de Hans Christian—“**kuraĝulo ĉion atingas**”, diras dana proverbo—kaj ni ankaŭ povas diveni, ke se la **bonŝanco** nur en unu punkto ne helpus al li, tiam nun ne estus ekzistinta ia H. C. Andersen. Fakte la malfacilaĵoj kelkfoje estis tiom fortaj, ke li preskaŭ perdis la esperon. Oni rajtas kredi, ke multaj grandaj talentoj en la mondo pereis aŭ malaperis en la forgeson de la historio, ĉar “**la bonŝanco**” forestis, ĉar la cirkonstancoj ne estis favoraj al la talenta infano, ĉar tio simple ne estis ebla. Ĉiuj parencoj, gekonantoj kaj protekt-

antoj de la eta Hans Christian insiste malrekomendis al li strebi al la altaj celoj, kaj ili havis ĉian prudenton kaj antaŭsenton je sia flanko. Liaj planoj estis tiom fantaziaj, ĝis preskaŭ la limo de mensa malsaneco, sed samtempe li estis tiom simpatia kaj naive korduŝanta, ke oni sentis helpemon kaj bonecon al li. Komprenoble H. C. Andersen estis speciale talenta infano de sia naskiĝo, ekipita per abnorma sentemo (frenezeco estis en la patra familio) kaj tre viva fantazio. Li havis la sorton esti sola infano, kaj la feliĉon esti sola infano en bona kaj amika hejmo, kie la gepatroj amis unu la alian, kaj amis la knabon. Li kreskis en kvieto, kiel trankvila introspekta infano, kiu ludis kun si mem, en la mondo de la fantazio, kun bildoj kaj historioj kaj pupoj kaj teatro. Li estis karakterize kreanta, produktiva infano, kaj male de aliaj malriĉaj infanoj li povis sekvi sian naturon, povis esti kiel li volis, jes, li tute simple dorlotiĝis, anstataŭ esti ŝarĝata per laboroj kaj devoj, por kio certe estus sufiĉe da kaŭzo en la malriĉa hejmo. La patro estis “**liberŝuisto**”, tio estas ŝuisto ekster la korporacio, sed memstara, pensema kaj kritikema animo, kiu sentis sin destinata por io pli alta ol ŝuisto; li kapablis voĉlegi la fabelojn de 1001 noktoj kaj la komediojn de Holberg (Dana komedi-verkisto) antaŭ sia filo. La patrino estis multe pli aĝa kaj naskis infanon antaŭ la geedziĝo. Post la morto de la patro en 1816 la malriĉeco fariĝis premanta, iom post iom fakte mizera (la patrino sin vivtenis kiel lavistino kaj poste fariĝis drinkema), sed Hans Christian daŭre vivis en sia mondo de revoj kaj ludo.

La proleta medio donis al la estonta fabelverkisto du grandajn aktivojn, du specojn de spertoj, kiuj ne estis je dispono por liaj samaĝaj talentuloj de pli altaj ŝtupoj en la socio. La unua estis la proleta sfero en kiu li kreskis, primitiva aŭ nur antikva mondo plena je restaĵoj de popolkredo, popollegendoj, magio kaj idoleco, precipe lia patrino estis tre superstiĉa, kaj detaloj en la vivhistorio de H. C. Andersen forte substrekas, kiom profunde la kredo pri magio de la objektoj sidis en li mem. Tio signifis grandan fortigon kaj nutraron por lia fantazio. La alia flanko de la proleta medio male fortigis lian realsenton, lian realan senton pri postuloj de la vivo. Kiel proleto li vidis la socion de malsupre: mizero kaj ĉifonuloj, drinkemo kaj prostituado, homruino en la malliberejo aŭ en la frenezulejo en Odense. Li vizitis multajn hejmojn, ĉar li estis interesa infano, kiu povis rakonti historiojn kaj kanti memfaritajn kantojn.

La travivaĵo, en la teatro en Odense, vidi reĝan teatron prezentadon estis decidiga por lia estonteco: li deziris fariĝi dancisto aŭ kantisto ĉe la teatro. Kaj kontraŭ ĉies konsiloj kaj avertoj la 14-jara longa kaj strangaspekta knabo iris al Kopenhago por serĉi bonŝancon kun 10 taleroj (malnova monunuco dana) en la poŝo, kaj krom tio nur kun sia forta memfido kaj kredo je la boneco de la sorto. Kompreneble li malsukcesis, la direktantoj de la reĝa teatro lin malakceptis, same faris la dancistino, kiun li vizitis kaj konsternigis dancante en ŝia ĉambro soldancon. Sed tamen la bonŝanco kaj liaj strangaj ecoj havigis al li protektantojn inter kopenhagaj artistoj, tiel ke li ricevis monon por iom lertigi sin. Li vivis tre malbone en la ĉefurbo dum tri jaroj, poste eĉ pli mizere kaj finfine sur la rando de la senespero. Kiel statisto en la reĝa teatro li ensorbis la ravan atmosferon de la teatro, kaj li komencis verki teatraĵojn. Nun li devus fariĝi poeto, ĉar lia bela kantvoĉo malaperis, kaj lia aspekto faris lin maltaŭga kiel artiston. Du dramojn li verkis, laŭ la



Domo en Odense, en kiu iam loĝis H. C. Andersen. Ĝi nun estas uzata kiel muzeo.

plej bonaj modeloj de la tempo. Senhelpaj kaj neintence komikaj ili estis, sed ili fariĝis lia savo. La teatra direkto trovis ilin promesantaj kaj la plej granda protektanto de H. C. Andersen, la financdeputito Jonas Collin, unu el la plej potencaj viroj de la ŝtato, helpis lin—el la plej granda mizero kaj metis lin helpe de la reĝo en la latinlernejon de Slagelse.

Artiumo—studenta ekzameno—tiam estis necesa akceptilo al la parnaso, kaj la pli altaj kultur-rondoj. Sen klasika edukado la proleta knabo de Odense neniam estus pli ol mizera originalo. Estis por li granda provo, terura tempo. Jen du kontraŭaj fortoj karambolis, kvazaŭ fajro kaj akvo: senpera, impulsema, kreanta kaj improvizanta naturo devis porti la ĉenojn de ordemo, diligenteco, disciplino, precizeco kaj ekzameno laŭ la malnova lerneja formo. La rektoro de la lernejo fariĝis pli kaj pli ekscitita pri li, fine rekte malamika kaj moke ironia. Kiel neniam antaŭe aŭ pli poste H. C. Andersen ĉi tie estis “la malbela anasido”. Li sufiris, plendis kaj humiliĝis, en sia mizero preta rezigni pri ĉiuj revoj, sed denove li saviĝis, forprenita de la lernejo (la adiaŭaj vortoj de la rektoro estis: “Iru al la infero”) kaj preparata por

ekzameno per privata instruado. Li trapasis la lernejan purigadon, konservante sian artistan naturon, sed tio estis por li multekosta: la daŭra timo kaj humiliĝo de ĉi tiuj lernejaraj jaroj estas la ĉefaj kaŭzoj de lia neŭrotika karaktero dum la resto de la vivo, de lia malplivalora sento kaj de la—de tio devenanta—abnorma sentemo antaŭ kritiko kaj abnorma bezono por laŭdoj kaj gloro, kaj lia fama kaj senlima vanteco.

Post la ekzameno en 1828 H. C. Andersen daŭrigis la studadon ankoraŭ unu jaron, sed tiam ĉesis kaj povis de tiam vivteni sin per sia plumo. Li nun estis akceptita en la literaturaj rondoj. Kopenhago tiam estis, en la tempo 1825—50, la centro de malofta spirita evoluo, tre nekutima intereso pri filozofio, literaturo kaj arto, eble speco de rekompenco por la politika neaktiveco dum la absolutismo. Etika klereco estis la celo de tiu tempo kaj la reĝa teatro estis la centro de la vivo. Tiun tempon oni nomas “la dana orepoko” kaj tiam vivis la poetoj Oehlenschläger kaj Grundtvig, la skulptisto Thorvaldsen, la sciencisto H. C. Oersted kaj la filozofo Søren Kierkegaard, krom multaj aliaj eminentaj personoj, kies nomoj ne estas konataj ekster la limoj de Danujo. Estis fruktedona tempo, sed ankaŭ eta mondo, kie oni tro bone konis unu la alian, kaj kie kritiko, ironio kaj ĉikano bone floris. Ankaŭ tiu ĉi delikata, preskaŭ superkulturita atmosfero estis por H. C. Andersen bona lernejo. Jen oni postulis ne nur personecon kaj ideriĉecon, sed en eĉ pli alta grado la formalan virtuozecon, la elegantecon, la spritecon kaj la akran plumon kiel defendilojn. H. C. Andersen estis kutima gasto ĉe multaj el la altrangaj familioj de la urbo kaj ĉe signifaj poetoj kaj artistoj. Lia spirito abunde nutriĝis. Grandan influon al lia viv- kaj artpercepto havis la amikeco kun H. C. Oersted. Kaj en la multnombraj situacioj, kie li daŭre sentis la protektantan ŝajnafablecon, malrespekton aŭ sentis la venensagojn de la kritiko, li lernis uzadon de siaj talentoj por humoro kaj ironio. Li vere hardiĝis

kaj aklimatiĝis al la diversaj rondoj. Liaj denaskaj kapabloj, lia kreskado en la proleta medio, liaj konfuzaj kaj turmentaj studjaroj en la teatro kaj en la latinlernejo, kaj lia literatura kleriĝo en la plej altaj rondoj de la ĉefurbo—jen la kondiĉoj por lia verkado. Lia aŭtoreco jam komenciĝis en la jaro 1822, tuj antaŭ lia restado en la lernejo en Slagelse, per eta kajero “Junecaj klopodoj” sub pseŭdonimo William Christian Walter (William Christian Walter Shakespeare, kaj Walter laŭ Walter Scott). Per freŝa emo li post la studjaroj komencis produktadon en multaj diversaj formoj: de poemoj, vojaĝpriskriboj, romanoj kaj teatraĵoj. En la teatro, kiu posedis lian amon, li havis nur malmulte da sukceso, tamen estis akceptita la dramo *Mulatten* (la mulato, 1840), la opera-teksto de *Liden Kirsten* (eta Kirsten, 1846) kaj la komedio *Den ny Barselstue* (la nova akuŝejo, 1844). Vojaĝi kaj vidi fremdajn landojn estis por li, dum la tuta vivo, la plej granda ĝojo kaj inspiro, lia unua prozaĵo estis fantaziplena priskribo de *Fodrejse fra København til Oestpynten af Amager* (Piedvojaĝo de Kopenhago ĝis la orienta marbordo de Amager, 1829), poste sekvis la de Heine inspirita *Skyggebilleder* (ombraj bildoj, 1831) priskribo de vojaĝo al Harzen, kaj en postaj jaroj li daŭre entreprenis novajn vojaĝojn, precipe al suda Eŭropo. Longa vojaĝo tra Germanujo—Italujo—Grekujo—Turkujo kaj hejmen laŭ Danubo kaŭzis la brilan priskribon *En Digtets Bazar* (Bazaro de poeto, 1842). Poste venis la vojaĝpriskriboj *En Svedujo* (1851) kaj *En Hispanujo* (1863). Ĉi tiuj vojaĝlibroj elradias liajn specialajn observpovon kaj vojaĝoĝojon, lian senton por la poezio de la realeco kaj de la ĉiutago, kaj inter alie ili montras al ni, kiel li meze en la romantika tempo ĝojis pri la teknika evoluo kaj sentis ĝian enorman eblecon. Li povis fantazii pri la flugmaŝino kaj pri fenomenoj similaj al la radio.

Pli konata li fariĝis pro siaj romanoj. Post sia raveco pri la travivaĵoj de la kolorriĉa popolvivo en Italujo li elverkis ĉi tiujn romanojn: *Improvisatoren*

(la improvizanto, 1835), kiu rapide fariĝis vera sukceso, tradukita kaj konita en eksterlando. Poste sekvis *O.T.* (1836) kaj *Kun en Spillemand* (nur muzikisto, 1837). Komunaj por tri romanoj estas la fortaj elementoj de membiografio kaj memtravivaĵoj, impresoj de liaj infaneco kaj juneco, la mizero kaj la suferoj de la malriĉa artisto, enkadritaj de pitoreskaj kaj veremaj rakontoj similaj al la vojaĝpriskriboj. En *De to Baronesser* (la du baroninoj, 1848) malapejis la subjektiva elemento, dum la substreko de la socia nejusteco estas pligrandigita. Ambaŭ du heroinoj de la libro montriĝas esti naskitaj en la plej malaltaj rondoj de la socio. La lastaj romanoj estas *At vaere eller ikke vaere* (ĉu esti aŭ ne esti, 1857) kiu temas pri la lukto inter kredo kaj scio, kaj *Lykke—Peer* (bonŝanculo, 1870).

Ĉiuj la supre cititaj verkoj estus povintaj havigi al H. C. Andersen grandan reputacion en lia tempo, sed la mondfamon kaj posttempan amon kaŭzis kompreneble *La fabeloj*. La unua kajero kun la fabeloj (Fajrilo, Malgranda Niko kaj granda Niko, Reĝidino sur pizo, Floroj de la malgranda Ida) aperis 1835, en la sama jaro kiel "la improvizanto", kaj antaŭ la fino de la jaro ankoraŭ unu kajero (enhavante inter alie: Elinjo-Fingreto kaj Vojkamarado). Tria kajero (enhavante inter alie: La virineto de Maro kaj La novaj vestoj de la reĝo) aperis 1837. Estis malgrandaj modestaj kajeroj, kiuj ne vekis tro da intereso, sed la saĝa H. C. Oersted jam tiam diris: la romanoj famigis Andersen, sed la fabeloj faros lin senmorta. La verkisto mem apenaŭ komprenis, ke jen li trovis sian veran esprimformon, tiun stilon, kiu kunigis ĉiujn liajn fortojn en unu tuto, sed, la akcepto de la fabeloj ĉirkaŭe en la mondo verŝajne iom post iom montris tion al li. Li daŭrigis ĝis siaj lastaj jaroj, kun paŭzoj de tempo al tempo, aperigi novajn kolektaĵojn da fabeloj kaj historioj, ĉefe en serioj 1843—48, 1852—53 kaj 1857—72. Dum la unuaj kolektaĵoj nur estis "Fabeloj rakontitaj por infanoj" li poste en la daŭro de

la jaroj agordigis kaj riĉigis la formon tiel, ke la fabeloj ofte sin turnas kaj al infanoj kaj al plenkreskuloj. Jes kelkfoje nur al plenkreskuloj. La historioj ofte kreskis ĝis longaj noveloj aŭ ĝis vivfilozofiaj simboloj.

Kiel infano H. C. Andersen estis fantazianta, improvizanta, rakontanta naturtalento. Dum sia juneco li uzis sian genian rakontpovon por la infanoj de tiuj kopenhagaj familioj, kiuj lin gastigis. Li fariĝis verkisto en la romantika tempo, kiam oni entuziasmiĝis pri popolfabeloj kaj fantazia verkado, kaj kiam precipe germanaj, sed ankaŭ danaj verkistoj denove vivigis tiujn formojn. Estas kompreneble, ke Andersen devis uzi la fabelan formon, kaj keli superu ĉiujn siajn kunulojn. Kial? Kio estas la sekreto de la forto de liaj fabeloj? Mi opinias, ke oni povas montri al du ĉefkaŭzoj. Unue la magia kaj mirakla mondo de la fabeloj estis por H. C. Andersen kaj lia infanmedio io natura kaj vera, io, en kio li kreskadis kaj kun kio li vivis. Li ne bezonis, kiel devis liaj germanaj antaŭuloj Tieck kaj E. T. A. Hoffmann kaj Chamisso, imiti malnovan formon, ne surprēni sur sin rolon de naŭva rakontanto, kaj senpera infaneca naturo. Li estis tia. Tial oni sentas liajn fantaziaĵojn, lian ludon kun la objektoj, liajn inspirojn de floroj, insektoj, pilkoj kaj stansoldatoj kiel konvinkigan artistan veron.

Due, lia propra vivo formis sin kiel pruvo je la enhavo de la popolfabeloj: la revo de la ordinaraj homoj pri sukceso, la privenko de ĉiuj malfacilaĵoj kaj altrangaj konkurantoj de la malriĉa knabo, la optimisma kredo je la plej interna justeco de la estado, la kredo, ke natureco kaj sana prudento privenkos riĉecon, snobecon, hipokritecon kaj maljustecon. Liaj propraj spertoj, liaj venkoj same kiel liaj humilaĵoj, eniras kiel vivanta ŝtofo en la plej multajn el la fabeloj. Do ankaŭ ĉi tie vero anstataŭ imitaĵo. Krome la fabela formo donis al li eblecon, pere de bildlingvo kaj ruza simboliko esprimi tion, kion li ne povis permesi al si elparoli rekte: li povis esprimi siajn suferojn kaj sian fieron (la malbela anasido), sed ankaŭ

ironii pri siaj propraj malfortoj; li povis rakonti pri sia malfeliĉa patrino (ŝi estis tute sentaŭga), montri sian simpatian por la malfeliĉuloj en la socio (Ĉio sur sian ĝustan lokon), kaj ataki la entuziasmon pro la malnova tempo (Galoŝoj de feliĉo), kaj li povis ataki siajn kontraŭulojn, venĝi pro nejusteco kaj humiliĝo kaj inciteti la kritikantojn. Li estis majstro pri la laste nomita. Multaj moketoj kaj malicaĵoj sin kaŝas en la naiveco de la fabeloj. Ni bone konas liajn vivon kaj pensojn. Li skribis taglibron, skribis amasojn da leteroj, kaj plurfoje li donis sian membiografion.

28-jara li verkis sian unuan "Levnedsbogen" (vivpriskribon—nur eldonita en 1926), sed ĉefa verko estas *Mit Livs Eventyr* (la fabelo de mia vivo, 1855), la preciza rakonto pri lia malfacila vojo al la famo. En tiu ĉi jaro li jam atingis la grandan reputacion, fariĝis konata ekster la limoj de Eŭropo, kaj lia famo kreskis de jaro al jaro. Lia vanteco estis kontentigita pro tiuj admiro kaj honorigo, kiujn oni ĉie montris al li, tamen pli multe en eksterlando ol en lia naskiĝlando.

En Danujo li preferis restadis en la grandbienoj, en la plej altrangaj rondoj, kaj li estis ŝatata gasto ĉe la kortegoj kaj hejme kaj eksterlande. Li vivis el la varmo de la admiro kaj famo, ne povis vivi sen ĝi, ĉar li estis soleca homo, al kiu normala homa feliĉo ne estis destinita: la tragedian finon de juneca enamiĝo certe kaŭzis li mem, kaj lia tre preparolita amo al la sveda kantistino Jenny Lind ne estis reciproka. Ni povas dubi pri tio, sed li mem diris, ke li estas feliĉa, kaj li dankis al Dio pro tio: "La historio de mia vivo instruos al la mondo, kion ĝi instruas al mi: ke ekzistas bona Dio, kiu gvidas ĉion plej bone."

Li mortis en Kopenhago la 4-an de aŭgusto, 1875.

—Sven Møller Kristensen

Tradukis: Gustav Kühlmann



Vokas Bolonjo

Adreso: 40-a Uniuersala Kongreso de Esperanto, ĉe CIT, Piazza Nettuno 2, Bologna, Italujo.

Kotizoj: Post 31 marto la kotizoj plialtiĝas. Bonvolu konsulti la tarifon. Aliĝiloj haveblaj ĉe landaj asocioj de UEA kaj la Kongresa Oficejo.

Limdato de aliĝo: Konforme al la Kongresa Regularo de UEA la L. K. K. rifuzos akcepti aliĝojn post la 30-a de junio. La aliĝiloj devos esti en Bologna je tiu dato. Je la 30-a de junio la L. K. K. fermas siajn kontojn por fari la necesajn kalkulojn prete por la Kongreso. Sekve ne sendu monon al L. K. K. tiel ke ĝi atingos Bologna en julio.

Transporto en Bologna: La urbestro de Bologna jam promesis senpagan veturadon dum la kongresa semajno.

Nomigo de strato: Promesite estas, ke dum la Kongreso la magistrato ceremonie inaŭguros straton kun la nomo ESPERANTO honore al la Kongreso.

Jubileo: La urbestro de Bologna invitis al la Jubilea Kongreso la urbestron de Boulogne-sur-Mer, hejmo de la Unua Kongreso.

Loĝigado: La Loĝiga Servo informas ke ĉiuj unulitaj ĉambroj jam estas rezervitaj. Nepre ne plu mendu sed faru aranĝon pri divido de ĉambro.

Statistiko ĝis fino de marto: Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 21, Belgujo 13, Brazilo 3, Britujo 80, Cipro 1, Danujo 36, Finnuloj 46, Francujo 202, Germanujo 90, Hispanujo 5, Irlando 3, Italujo 260, Izraelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 54, Kubo 1, Maroko 20, Nederlando 136, Norvegujo 26, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 91, Svislando 25, Urugvajo 2, Usono 12. Sumo el 29 landoj 1141. Nemembroj de UEA 23%. Instruistoj 18%. Gejunuloj 7%.

Mason Stuttard, KKS.

Reprints of the article "Triumph in Montevideo" may be obtained at \$1.50 per 100. Write North American Esperanto Review, 3412 N. Mullen, Tacoma, Wn.

(Continued from page 4)

came apparent that a wave of public opinion had been stirred up for Esperanto in the Conference city; indignation over the committee's action was rising and was a factor now to be considered by the delegates to the General Conference, who recognized that the matter might easily become a world-wide scandal. Many of them suddenly found time to study the documents provided them by the C.E.D. and even to attend the exposition.

With the realization that "the Esperanto affair," as it was called in Montevideo, had become a really hot issue, Dr. Lapenna determined to make one more effort to realize success out of failure. He asked for permission to speak before the Plenary Session, and was refused; but he succeeded in convincing representatives of UNESCO that the Mexican Resolution should be reintroduced and the entire Conference given the opportunity to vote on it. At 5:15 on Dec. 10 the President announced that the next item on the agenda would be the International Petition in Favor of Esperanto. The Mexican delegation reintroduced its resolution with a minor change from its original form. A few minutes thereafter the vote was taken and 30 hands were raised in favor, five delegations were op-

posed, there were 17 abstentions and the rest of the delegations did not vote at all. Among those voting in favor of the resolution were, according to Dr. Lapenna, Mexico, Uruguay, Sweden, Norway, Switzerland, the Netherlands, Luxembourg, France, Brazil, Great Britain, Italy, Greece, Yugoslavia, China, Austria, Honduras, Israel, and New Zealand. Among those who opposed were Denmark, Egypt, and Cuba. Again, the Soviet Union and its satellites abstained.

And so, at exactly 5:30 on the 10th of December, 1954, the historical decision which amounts to the first official recognition of Esperanto by an international organization at the governmental level was proclaimed by the President of the General Conference.

It is too soon to know exactly what consequences UNESCO's action will have in the North American countries. At the very least, it is to be hoped that the American governments, the public, and the press will interest themselves in Esperanto enough to judge its merits on the basis of what has been accomplished in 67 years of practical use throughout the world, rather than on the basis of uninformed disinterest, as has been the case so often in the past.

HOW CAN I LEARN ESPERANTO?

For private study order one of these texts:


The Esperanto Teacher.....	\$.45
Nelson's Esperanto Course.....	1.50
Step by Step in Esperanto.....	1.50

or

Order the Esperanto Teacher, above, and enroll in our free correspondence course: Esperanto by Mail, 123 East 35th St., Brooklyn 3, N.Y.

Novaj

Libroj



Nederlando, bildlibro kun fotografiaĵoj de Ed. Van Wijk, teksto de Mr. E. Elias. Teksto tradukita por la Esperanta eldono de S-ino J. R. G. Isbrücker. Eldonis W. van Hoeve N. V., Hago, Nederlando.

Ĉi tiu libro estas tre eble la plej bela Esperantolibro iam eldonita. Teknike, ĝi estas la perfekteco mem: preso, papero, bindo, rotogravura reprodukto de la fotografiaĵoj—el kiuj 16 estas presitaj en bela koloro—estas sen ri-proĉo. Kaj la enhavo: bona, bonega, eĉ pli ol tio. Sur 196 paĝoj la plej ravaj bildoj, akompanataj de taŭgaj klarigaj, sed ne tedaj—tekstoj portas aŭ reportas la vidanton al tiu landeto, kiu estas “Miraklo el Akvo.” En dek-unu fotoserioj ni vizitas la grandajn urbojn de Nederlando, turistoj en la provincoj, lasas nin raviĝi de la belegaj floroj, ekkonas la popolon de tiu lando, kaj konstatas nian admiron por la popolo kaj por la lando.

Kiu jam vidis Nederlando kaj komprenas Esperanton, *nepre* havigos al si ĉi tiun plej eksterordinaran libron, spite ĝian iom altan koston. Efektive, kvankam ni eble al kutimiĝis al multtekostaj Esperantolibroj, tiel riĉaspekta, grandformata kaj teknike bela libro kiel *Nederlando* certe valoras ĝian prezon.

Kiu neniam havis la feliĉon mem viziti Nederlando, trovos, ke la libro estas lia veturbileto por ebligi al li havi dum la vivo tiun privilegion.

La traduko de la teksto estas sen makulo. Preseraroj ne estas troveblaj. Nepre dirinda pri ĉi tiu libro estas ankaŭ ke ĝia propaganda valoro, dum ĝi simple kuŝas sur breto en la hejmo de Esperantisto, estas ega.

Kiel oni legas en la reklamoj, “bona libro estas kamarado por la tuta vivo.” Kaj tia kamarado povas esti *Nederlando*.

Jarlibro de la UEA, 1954, Dua parto. 77 paĝoj, kun Matematika Terminaro.

Jen la konata formato kaj interna aranĝo de la utila gvidlibro pri la Esperanto-movado, kiun ĉiu serioza Esperantisto devus havi. La libro enhavas statistikan informon pri diversaj flankoj de la internacia movado, kaj mallongajn raportojn de la aliĝintaj landasocioj. Pli ol duonon de la libro okupas Matematika Terminaro, la produkto de kiu devis esti giganta laboro por ĝia kompilinto, C. M. Bean, pri kies kompetento atestas tuta serio da postnomaj literoj.

Matematika Terminaro, aparte presita (vidu supre) de UEA laŭ la sama formato kaj ĝenerala aspekto kiel ĝiaj antaŭaj terminaroj: aeronautika, arma, marista, muzika, k. t. p. 40 paĝoj, sama formato kaj plaĉa preso kiel la Jarlibro.

Historia dokumento estas la februara numero de *Esperanto-Revuo Internacia* en kiu troviĝas ampleksa raporto pri ĉiuj okazintaĵoj en Montevideo, pri la efikoj de la UNESKO-decido, pri la Universala Ekspozicio de Esperanto; ankaŭ represo de la ĉefaj leteroj kaj dokumentoj rilate la aferon ĉe UNESKO. Pro la graveco de ĉi tiu numero, UEA vendas ĝin kiel libron. Neabonantoj volos havi la abunde detalan raporton, kiu ampleksas preskaŭ ĉiujn 44 paĝojn.

Poemoj de Omar Kajam, en traduko de G. Waringhien. Eldonis S.A.T. 60 paĝoj, mezkvalitaj papero kaj preso, paperbindo.

En la literaturo de la tuta mondo, la poemaro de Omar Kajam estas unika pro tio, ke ĝi ŝuldas sian famon al traduko. Verŝajne la originalaĵo ne estus hodiaŭ konata, kaj la nomo de Omar mem estus forgesita, se ne estus aperinta la dek-naŭjarcenta traduko anglalingva de Edward Fitzgerald. Tiu "traduko" estis tiel libera, ke multaj partoj de la originalo estas ellasitaj, aliaj partoj estas apenaŭ rekoneblaj, kaj granda parto de la traduko tutsimple estis inventaĵo de la tradukinto. Eĉ la filozofio de la verkinto, fundamenta ĉar ĝi estas filozofia verko, kaj certaj moroj de tiama (dek-dujarcenta) Persujo, estis alie prezentitaj de Fitzgerald ol en la originalaj poemoj, aŭ "robaioj".

Tiel okazas, ke la robaioj de Omar estas malmulte similaj al la robairoj de Fitzgerald, kaj ke la anglalingvano-Esperantisto, legante ĉi tiun multe malpli liberan tradukon de Waringhien, havas la strangan senton, ke li legas ion tre fremdan, kiun li devus rekoni sed ne povas.

Waringhien uzis la aleksandran versformon, plurloke kun granda sukceso:

"Hodiaŭ via mano morgaŭon
ne disponas,
kaj zorgoj pri morgaŭo
al vi nenion donas.

Ne perdu vivmomenton,
jen kion saĝ' admonas,
Ĉar de vivresto via
la longon vi ne konas."

Pli ofte la ritmo estas malpli glata:

"Kiam en tomb' de miaj
esperoj Sort' min tretos,
kaj min, senplumigitan
birdeton, Mort' forĵetos,
zorgu: el mia cindro
vi faru nur pokalon!
Eble, kiam ĝi plenos
de vin', mi revivetos..."

Kiom Waringhien evitis troan libercon en la senco de la traduko, li tamen ne hezitis pri liberecoj kun la lingvo. La uzo de formoj kiaj "hiero" por *hieraaŭ*, "ĉi" por *ĉi tiu*, "juno" por *junaŭlo*, kaj la uzo de "re" kaj "mis" kiel memstaraj vortoj, estas bedaŭrindaj. Se ano de komencanta kurso dirus "kiu venis re?" aŭ "preterlasu hieron" aŭ "drinku ĉi vinon" ni certe atentigus lin pri lia eraro.

Kompreneble, ĉi tie ne temas pri eraro aŭ nescio, sed pri la teknikaj liberecoj, kiujn la tradukinto permesis al si "por la bono de l' arto". Sed verŝajne la traduko sukcesas—kaj ĝi ja estas sukceso—malgraŭ, ne dank' al, tiaj liberecoj.

Legu kaj Ridu, de K. O. Schmidt. Eldonis Siegfried Ziegler Verlag, Munich. 88 paĝoj, klara presoj, paperbindo.

La libron plenigas "ŝercoj, spritaĵoj, amuzaĵoj, malicaĵoj" kaj "groteskaĵoj" plus ĉapitro pri humoraĵoj en la vivo de infanoj. Fakte ĝi estas kolekto de centoj da ŝercoj, laŭ la germana speco de humoro. Granda parto de la materialo estas iom tro malkonciza por nia humorsento. Sed ĝi ja amuzas, kaj oni povas ĝin legi facile kaj kun ĝuo.

(Libroj recenzitaj en la *Review* estas mendeblaj, krom la Jarlibroj de UEA, ĉe *Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.*)

ANONCOJ

Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifloja apero. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.

FERIU en la belega Muskoka distrikto kaj vizitu nin! Nia soleca domo en ĉarma regiono estas malfermata al ĉiuj samideanoj. Ni intencas aranĝi septagajn kursojn por komencantoj kaj progresantoj. Ges-roj Eichholz, Esperanto-Domo, Port Sydney, Ont., Kanado.

Donations to the Review Fund

We acknowledge with thanks the following contributions: Armin Donois, \$10; R. C. Marble, \$15; Anonymous, \$10; R. M. Pease, \$5.

EXECUTIVE BOARD DECISIONS

1. Appointed Roan U. Orloff, 31 Nahanton St., Newton Centre 59, Massachusetts, to fill the Executive Board vacancy created by the death of Sano Adams.

2. Authorized payment of printing costs for official stationery.

3. Accepted the invitation of the San Diego Esperanto Society to hold the 1955 Congress in that city, and named Dirk Brink as Local Congress Committee Chairman.

4. Approved the program of the 1955 Congress as presented by the Local Congress Committee.

DEATHS

With the very deepest regret we note the passing of another pillar of the North American Esperanto Movement. Helene Wolff passed away Sunday, March 27, in San Francisco. Death came as a result of a heart ailment. She was 66 years old.

Helene Wolff was born in Kleve, near the Dutch border, in Germany. She became an Esperantist in 1927, and subsequently was very active in the movement in Germany. She translated two books into Esperanto: *La Okuloj de la Eterna Frato*, by Stephen Zweig, and *La Hirundlibro*, by Ernst Toller. With the advent of the Nazi regime in Germany she was persecuted for her Esperanto activities until she succeeded in leaving the country for the United States, where she remained until her death.

Miss Wolff was a firm believer in Esperanto and in its *interna ideo*; she worked tirelessly and unceasingly for the movement. She took part in four Universal Congresses and numerous national ones, was for years a delegate of the UEA, and lectured before countless civic, service, and religious groups in California, particularly in the Bay Region. At the time of her death she was President of the Esperanto Society of the Bay Region.

Her death is a great shock and a distinct loss. For those of us who were privileged to know and work with her, she was always a source of inspiration and courage.



GOING TO THE CONGRESS?

Read a good book on the way

ESPERANTO, of course!

One of the good places to buy it:

Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.

FREE BOOK LIST ON REQUEST

Esperanto-by-Mail, 123 East 35th Street, Brooklyn 3, N. Y.

APPLICATION BLANK

I enclose \$_____ for: (check)

Regular member _____ \$ 3.00

Supporting member _____ 5.00

Patron _____ 10.00

Life member _____ 50.00

Man and wife _____ 4.00

Subscription only _____ 1.75

Name _____

Address _____

City _____

Print your name and address clearly. Send to: Esperanto League for North America, Meadville, Pa. Advise the League promptly if you change your address.